

malbona lupo reenkarniĝinta

ROQUE JACINTHO



2ª edição em esperanto

Do 2,5.º ao 5.º milheiro

ARTE

JOEL LINCK

TRADUÇÃO

ALLAN KARDEC AFONSO COSTA

REVISÃO ESPECIAL

PROF. BENEDICTO SILVA

4-BB; 005.2-O; 7/1978

Copyright 1974 by

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA

(Casa-Mãter do Espiritismo)

AV. PASSOS, 30

20051 — Rio, RJ — Brasil

Composição, fotolitos e impressão offset das

Oficinas Gráficas do Depto. Editorial da FEB


Rua Souza Valente, 17

20941 — Rio, RJ — Brasil

C. G. C. n.º 33.644.857/0002-84 I. E. n.º 81.600.503

Impresso no Brasil

PRESITA EN BRAZIL



Englutinte la avinon de Ruĝa Ĉapeto, Malbona Lupo surmetis kufon kaj kuŝiĝis sur lito, atendente la knabinon.

La junulino ne rimarkis ĝian ruzaĵon.

Ŝi fidplene eniris tra la larĝe malfermita pordo kaj alproksimiĝis al la lito, kie troviĝus ŝia avino kaj renkontis Malbonan Lupon kuŝanta, prenante ĝin por sia avino.



— Kio estas al vi? — ŝi demandis mirplena.

— Mi estas tre malsana — hipokritis la fripono, avidanta enbuŝigi ŝin. Alpaŝu pli proksimen, mia nepineto!

Ĉapeto alproksimiĝis iom pli.

— Por kio via orelo estas tiel longa, Avinjo?

— Por pli bone aŭdi vin, karulino!

— Por kio viaj brakoj estas tiel grandaj?

— Por pli bone brakumi vin, Ĉapeto!

Malbona Lupo lekis al si la lipojn kun rigardo, montranta grandan apetiton.

— Por kio tia buŝego, Avinjo?

— Por enbuŝigi vin!

Dirinte tion, ĝi englutis Ruĝan Ĉapeton.

Malbona Lupo kontenta, kun la avino kaj Ruĝa Ĉapeto en la ventro, decidis fari la digeston sur la lito mem, en tiu domo. Ĝi estis tiel peza, ke ĝi eĉ ne eliris de sur la lito, kaj ĝi turnis sin sur unu flankon kaj endormiĝis.

Sed ĝia dormo estis maltrankvila.

Ĝi ĝemadis, skuiĝadis, kriadis — ĉio en sonĝo.


La ĉasisto en la arbaro, kiu tre bone avertis Ruĝan Ĉapeton pri la danĝera Malbona Lupo, preterpasadis la ĉirkaŭaĵojn, kiam li aŭdis tiujn veojn, tiujn skuiĝojn, tiujn kriojn de Malbona Lupo.



Li alproksimiĝis al la domo, aŭskultis kaj eniris.

Apenaŭ li distingis Malbonan Lupon, li ekkomprenis tion, kio okazis kaj tial, elingiginte sian tranĉilegon, li tuj zorge ektrancis la ventron de la lupo, ne ĝin vekante kaj eltiris la avinon kaj Ruĝan Ĉapeton.

Li ŝovis iajn ŝtonojn en ilian lokon kaj kunkudris la ventron de la besto.



Kiam la lupo vekigis, ĝi sentis multe da soifo.

Li eliris el la domo, serĉe de akvo.

Li vidis lagon kaj eniris en ĝin por trinki akvon, sed ĝi estis tiel peza, tiel peza, ke ĝi dronis en ĝi kaj mortis.

Laŭmezure kiel Malbona Lupo enprofundiĝis en la lago, sufokigante, ĝi revidis per sia imagpovo ĉiujn malicaĵojn, kiujn ĝi praktikis dum sia vivo. La lastaj, kiuj ankoraŭ estis tre klaraj, estis la scenoj pri la engluto de la avino kaj tuj poste pri tiu de Ruĝa Ĉapeto.

Ĝi ekploris pentanta kaj elkarniĝis.

Ĝi iom post iom malligiĝis de sia inerta korpo kaj, en spirito, ree sentis sin malpeza, ankoraŭ pli malpeza, en tia grado, ke ĝi liberiĝis de la fundo de la lago kaj venis al la supraĵo.

Sed la pejzaĝo, kiun ĝi vidis, estis alia.

Ĝi estis en la Spirita Mondo.

Ĝi eksentis teruron, ĉar ĝi ne konis tiun mondon kaj vidadis apud si multe da aliaj lupoj, hurlantaj kaj konfuzite forkurantaj.

Sed tie nenio ŝajnis malamika kaj, kvankam malvigliginta pro la elkarniĝo, ĝi tamen multe kaj mallaŭte ploris plu, ne sciante pri sia estonta destino.

Dum sia vivo ĝi estis tre malica — ĝi tion rekonadis.

Tiam, iu Spirito ameme venis al ĝi.

Malbona Lupo instinkte murmuris minacanta, sed la Spirito ne montriĝis timigita. Male. Li venis pli proksimen kaj karesis per la mano ĝian kapon, kun tia amema gesto, kian la lupo neniam antaŭe spertis.

Ĉiuj homoj ĉiam forkuradis de ĝi.

— Kiu vi estas? — demandis la lupo.

— Mi estas zorganto de malbonaj lupoj.

— Ĉu vi ne timas miajn dentojn?

La Spirito tre amike ridetis, asertante, ke li ne timas kaj diris plu:

**MI NE TIMAS VIAN PAROLON,
NEK VIAN BRUON RON-RONA.
KIU FARAS FIAN ROLON,
ANKAŬ TIU FARIGOS BONA.**



Malbona Lupo ekridegis.

— Ha, mia amiko — ĝi asertis arogante —, vi ne bone informiĝis! Dum mia tuta vivo mi estis malica kaj tia mi estos plu, por ĉiam. Ne perdu vian tempon... Ne nutru esperon regeneri min!

— Vi fariĝos bona, amiko lupo.

— Mi ne kredas.

— Mi garantias al vi, ke vi fariĝos bona. Sufiĉas memori, ke vi mem jam pentis pri via pasinta vivo kaj pri viaj malicaĵoj, en tia grado, ke vi ekploris en la momento, kiam vi dronis.

— Ĉu mi ekploris?! Ba! lupo ne ekploras...

La Spirito, tre saĝa, ne plu insistis.

— Se vi preferas tiel resti... — diris la sendito, ŝajnante foriri — mi estas devigata vin forlasi, tiel longe ĝis vi kun larmoj vokos min.

— Bonvolu atendi! — ekkriis la lupo, vidante, ke la afero ja estas serioza —. Mi ŝercadis! Vere mi forte laciĝas esti lupo.

Ĝi faris paŭzon kaj aldonis:

— Mi ekploris... de pento.

— Venu do kun mi.



Malbona Lupo estis en tre granda parko.

Dum ĝi atendis sian vicon esti intervjuita en la Instituto por Reĝenerado, ĝi aŭdis leonon, asertanta:


— Mi decidis pliboniĝi, se nur oni donos al mi okazon rekomenci mian vivon en la arbaro!


— Ĉu eble oni ĝin donos al vi? — demandis la lupo.

— Jes, sendube! — respondis la leono, per forta bleko. Mi jam vidis multajn el miaj malnovaj kamaradoj ekiri tien kun multe da espero.

— Mi dubas...

Sed la lupo ne restis plu en sia pesimismo, ĉar oni ĝin vokis al la Instituto.






Akompanante ian instruanton, ĝi trairis plurajn ĉambrojn kaj fine envenis en kabineton, kie ĝi estis metita antaŭ Spiriton, kiu portis veston de kuracisto.

— Sidiĝu, mi petas.

Malbona Lupo sidiĝis preskaŭ tremanta de timo, ĉirkaŭite de multe da strangaj aparatoj, kiujn ĝi neniam antaŭe vidis.

— Jen la slipo pri via vivo, lupeto.

La kompatinda ekstremis ankoraŭ unu fojon.



— Pri mia vivo? — ĝi balbutis, tre ruĝigante de honto.

— Pri via tuta vivo: naskiĝo, infanaĝo, juneco... Pri ĉiuj viaj eraroj kaj malicaĵoj, unu post alia, ĝis la tago, kiam vi dronis en la lago.

— Do... vi vidas, ke mi estas afero perdita!

La Spirito ridetis bonvoleme.

— Neniu naskiĝas por la malbono, lupeto. Ni estonte havos belan destinon kaj sufiĉas, ke ni kuraĝu forlasi la kampon de niaj eraroj, por ke ni tuj komencu nian saviĝon.

— Mi neniam estos bona — ĝi humile diris.

— Vi ne fariĝos bona en unu tago, sed per kelke da reenkarniĝoj vi korektos vin je viaj eraroj kaj malvirtoj.

— Perdu viajn esperojn...

La Spirito sciis, ke Malbona Lupo estas pentinta. Ĝi kun malĝoja humoro nur kredis, ke estas neebla ĝia konduto-plibonigo. Laca esti malbona lupo, ĝi dubis, ke iam ĝi fariĝos bona.

— Mi estas nerebonigebla — rediradis la lupo.



Sed la Spirito estis komprenema.

— Vi devas rekuraĝiĝi, lupeto, kaj vi vidos, ke ne ekzistas eĉ unu perdita lupo, en nia Instituto por Regenerado.

— Se ne estis ia ekzemplo de perdita lupo, jen mi la unua, vi povas kredi. Nenio alie konvinkos min, ĉar mi mem rekonas, ke mi estas problemo sen solvo. Mi estos plu lupo, sed malbona lupo, manĝanta avinojn kaj knabinojn, kiujn mi trovos sur vojoj... Mi scias, ke mi ĉiam tiel estos!

Estis kortuŝe aŭdi ĝin.

— Ni nepre pliboniĝas kun ĉiu tago. Tio estas unu el la Leĝoj de la Eterna Patro, kara lupo.

— Mi asertas, ke mi estas ekster tiu Leĝo...



Malbona Lupo estis necedema.

Malgraŭ la argumentado de la bona Spirito, en la Instituto por Regenerado, estis neeble konvinki ĝin. Li saĝe decidis kunvoki spertajn kamaradojn por solvi la malfacilan aferon.

Kune la saĝaj Spiritoj studis kaj studis.

Malbona Lupo ĉeestis ĉion, ne komprenante.

Fine du el la bonkoraj Spiritoj eliris kaj post ne longe revenis kun aparato tute simila al televidilo.

Ili starigis ĝin antaŭ la lupo.

— Ni decidis montri al vi vian estontecon.

— Mian estontecon?! — ĝi ekkriis.

— Jes! Ĉe okazoj similaj al la via, kiam vi estas firme konvinkita, ke vi estos malbona dum la tuta eterneco, ni devas levi angulon de la vualo, kovranta viajn estontajn vivojn, ke vi komencu kunlabori pli vigle por via propra reboniĝo.

— Ĉu mi vidos min... en la proksimaj vivoj?

— Certe!



Ili ligis iajn dratojn al la cerbo kaj koro de Malbona Lupo, adaptante la aliajn finojn al la aparato por estonteco-vido.

Poste unu el ili turnis butonon kaj la ekrano lumiĝis.

Malbona Lupo tuj vidis en la estonteco-vidilo la arbaron tiel konatan kaj ankaŭ la maldensaĵon tre familieran pro siaj promenadoj.

Ĝi mem tie estis tre malgranda.



Tiu sama ĉasisto, kiu plenigis ĝian ventron per ŝtonoj, estis kaŝita post stumpo de arbo, prete tenante armilon por pafi la lupeton.

Nenion sciante pri tio, la lupeto soifa venis al puto kun akvo kaj lekis la malvarmetan likvaĵon, kiu, enirante ĝian gorgon, refreŝigis ĝian korpon.

— Ha! — ekkriis la ĉasisto, rapidanta por preni ĝin ĉe la kolo, tute ne timante ĝian ron-ronon —. Mi estis tuj pafonta kontraŭ vi, pensante, ke vi estas lupido. Sed vidante vin leki la akvon, anstataŭ suĉi ĝin, kiel faras la lupoj, mi konvinkiĝis, ke vi estas simpla hundeto erarinta en la arbaroj.

Li tiam portis ĝin en sian kabanon.

La eklupo tie kreskis kaj fariĝis tre granda.

— Ia lughundo.

Jes!

Ĝi estis bela lughundo duone sovaĝa kaj danĝera, sed tre amema al la ĉasisto, kun kiu ĝi profunde amikiĝis. Ĝi tiel amikiĝis al li, ke ĝi ne detenis sin sekvi lin, kien ajn li iris, kaj dankis ĉiun fojon, kiam la mastro karesis ĝian kapon.



Sed unu tagon. . .

Unu tagon la ĉasisto eliris el sia domo frue en la mateno.

La fidela amiko lin akompanis, gaje saltante.

Subite la ĉasisto kriegis terurite.

Grandega krotalo estis preta fari al li la trafan kaj fatalan ekpikon.

La eklupo ne hezitis eĉ sekundon.

Pro la amikeco, ilin unuiganta, ĝi sin ĵetis kontraŭ la perfidan serpenton kaj mordis ĝin. Sed la krotalo maljuna kaj ruza kuntiris sian propran korpon kaj pikis ĝian kolon.

Falonte, jam sen forto, la hundo ne forlasis la predon.

La hundo mortis, sed donis tempon al la ĉasisto, ke li savu sin.

Kunportite en la brakoj de la ĉasisto, ĝi la unuan fojon sentis sin banata en larmoj de danko kaj frateco.

Ĉe sia enterigo, ĝi povis aŭdi la preĝon de sia amiko, peteganta, ke la Ĉielo benu la kompatindan hundon, sin oferinta por lin savi.



Malbona Lupo antaŭ la estonteco-vidilo estis tre kortuŝita kaj jam estis faronta demandon, kiam la scenoj de ĝia alia proksima ekzistado ekaperis.

Ĝi nun naskiĝis sen ia raso.

Forlasite de sia mastro, sur la bordo de vojo, ĝi malgaje vagadis de loko al loko, tiel longe ĝis ĝi ekvidis foran dometon. Ĝi sentis la odoron de la apetitiga manĝaĵo kaj, ĉar ĝi estis tre malsata, ĝi kuregis al la dometo por almozi pri iom da nutraĵo, kia ajn ĝi estas.

Bonkora maljunulino ĝin akceptis.

Tiu maljunulino ne estis alia, krom la avino de Ruĝa Ĉapeto, kiu, malgraŭ sia grandaĝo, estis plu sana, vivante en sia kabano en la mezo de la arbaro.


La eklupo jam ne murmuris nek minace montris siajn dentegojn. Ĝi fariĝis pli kvieta kaj milda, kaj gaje dankis la avinon, la bonfarantinon, kiu donacis al ĝi bongustan pecon da ostoj.

Ĝi ĝoje svingetis la voston.

Ĝi manĝis kaj, trinkinte lakton, ekdormis.

Tiele ĝi kreskis pli kaj pli ĉe la avino.





Iun nokton, ĝi jam estis tre granda, bona al la avino kaj duone sovaĝa al fremduloj, jen tri malicaj homoj provis invadi ŝian bieneton, ŝin endanĝerigante.

La hundo kuraĝe ekstaris.

Ĉiam bojante kaj kriante por helpo, ĝi atakis la homojn, tie kaŝiĝintajn, forpelante du el ili. Sed la pli juna decidis alfronti ĝin kaj, preninte lignopecon, tre forte batis ĝian nazegon.

Jelpante kaj sangante, ĝi ne retiriĝis.

La ĉasisto en la arbaro, kiu tie preterpasadis, altirite de tiu granda bruado, kuris al la hundo, kompletigis ties laboron kaj forkurigis la homon, ĝustatempe savante la avinon.

Ĝi ankoraŭ povis vidi la amikajn larmojn de la maljunulino.

Adiaŭante la ĉasiston kaj la avinon, ĝi tre trankvila penis rideti, danka por la kareso, kiun ambaŭ faris al ĝi, dum ĝia mallonga ekzistado.



Malbona Lupo ploradis en la Instituto, antaŭ la estonteco-vidilo, kie mallumiĝis la scenoj de ĝia lasta reenkarniĝo.


Ĝia koro estis alligita al tiuj du ekzistadoj, al la ĉasisto kaj la avino, kaj kiam ĝi jam kredis, ke estas eble ŝanĝi sian destinon, jen bildiĝis la scenoj de ĝia sekvonta vivo.

Tiun fojon ĝi reenkarniĝis, kiel vigla kaj denshara hundeto.

De sia malgrandaĝo, ĝi elmontradis la bonan karakteron, kiun ĝi akiris en siaj antaŭaj ekzistadoj kaj oni apenaŭ povus pensi, ĝin vidante, ke ĝi iam estis malbona lupo en la arbaro.

Ĝi estis tre amata de ĉiuj.

Infanoj kaj maljunuloj haltis por paroli kun ĝi, kaj ĝi, por elmontri sian dankemon kaj fari ilin ĝojaj, dancis kaj kantis, ravante ĉiujn.



Ruĝa Ĉapeto, ĝia mastrino, nepre volis, ke ĉiu homo konatiĝu kun ĝi. Ĉiufoje, kiam iu ŝin vizitis, ŝi vokis ĝin.

Kaj ĝi tuj aperis.

Ĝi ekkuŝis sur la genuoj de la maljunuloj, saltadis kun la infanoj, kiuj iris al ĝi, pliiĝante la nombron da homoj, kiuj ĝin amis.

Sed ĝi super ĉio vivadis por Dedeo.



Dedea, kiu kreskis je korpo, ne kreskis je inteligenteco kaj tial la aliaj infanoj ne ĉiam estis en kompanio kun ŝi. Ili preferis kolektiĝi al la plej petolemaj por siaj infanaĵoj.

Sed la eta hundo ne apartiĝadis de Dedea.

Ĝi longe aŭdadis ŝin kaj ankaŭ ĝi siavice diradis al ŝi per jeloj kaj aŭ-aŭoj la multajn historiojn, kiuj Ruĝa Ĉapeto rakontadis al ĝi, kvazaŭ Dedea estus la animo plej kara al ĝia koro.

Ruĝa Ĉapeto, kiu tre amis Dedeon, montriĝadis kortuŝita pro la spontanea ĝentileco de la hundeto, reciprokanta ŝian kareson per multe da aliaj karesoj.



Malbona Lupo estis ravita.

Sed oni malkonektis la estonteco-vidilon.

— Ĉu mi ja tia estos? — ĝi demandis.

— Jes, tio dependos de via peno kaj konduto. Tio, kion vi vidis, estas parto de la plano, kiun ni preparis por via regenerado. Komencante de via penton, tia estos la destino farota de viaj koro kaj cerbo, dum viaj proksimaj reenkarniĝoj, lupeto.

Malbona Lupo pensis kaj pensis.

— Nu, mi konsentas renaskiĝi, pro tio, ke mi ja povos elmontri en ĉiu ekzistado mian penton al tiuj, kiujn mi plej multe malutilis kaj ankaŭ plibonigi mian propran vivon.

Estis granda ĝojo.

La iama Malbona Lupo, gratulate de ĉiuj, estis akceptita en la departementojn, en kiuj ĝi lernos ŝanĝi sian agresimpulson en amikaĵojn, siajn instinktojn en sentojn, tial, ke pluraj ekzistadoj atendos ĝian agadon, ke ĝi konkeru kaj atestu sian efektivan regeneradon.



Bet-Lehem

(Al la tre kara Frato Iśmael Gomes Braga.)

Ĉu rev' aŭ songo? mi ne scias diri;
Dormanta, ne dormanta — mi ne scias;
Mi lasis min de forto stranga tiri
Kaj vidis, kiel menso fantazias...

Mi vidis tiam, kiom da aferoj
Ekzistas en Natur', kiom ĝi havas!
Jen la tritiko verdas, jen vinberoj
Oferas sin, jen pino streĉe pavas...

River' tiriĝas mole, serpentume,
Leviĝas rok', abism' oscedas, maro
En ŝaŭmo tondras, ĉio ja, resume,
La forton montras de l' Kreitajaro!

Mi aŭdas birdojn kun belsona kanto,
Mi vidas bestojn kun terura bleko,
Mi aŭdas ĝemojn de la suferanto,
Mi vidas homojn en mortinda peko...

Murmuras preĝoj el patrina koro,
Elfluas larmoj el brust' fianĉina;
Roson sopiras la senkulpa floro,
Kaj ĉie febro de labor' senfina...


Sed ĉio ŝajne haltis por momento,
Alia estis en la Spaco ĉio;
Jen ekaperas lum' el Oriento,
Jen Bet-Lehem — la nova Lum' de Dio!

23/12/1960

J. CRUZ E SOUZA

(Transskribita el la libro "Medioma Poemaro"
— mediuo: Porto Carreiro Neto —, eldomita de
FEB, 1972, paĝo 56.)

SÉRIE III



1 • O LOBO MAU REENCARNADO

Ilustração de JOEL LINCK

FAIXA ETÁRIA — 7/12

2 • A RAINHA CRUEL

Ilustração de JOEL LINCK

FAIXA ETÁRIA — 7/12

3 • O CAMINHO

Ilustração de JOEL LINCK

FAIXA ETÁRIA — 7/12

4 • O GÊNIO DA LÂMPADA

Ilustração de JOEL LINCK

FAIXA ETÁRIA — 7/12

5 • DONA LOBA

Ilustração de PAULO JOSÉ

FAIXA ETÁRIA — 7/12

Textos de ROQUE JACINTHO